

La Ondo de Esperanto

Internacia sendependa magazino en Esperanto. 2019. №4



Internacia sendependa magazino en Esperanto. 2019. №4 (294)

Ekde 2017 *La Ondo de Esperanto* aperas nur elektronike, kiel bitgazeto laŭ la normoj “pdf” kaj “ePub”.

Aperas ĉiumonate, krom aŭgusto. Senpaga literatura suplemento jarfine.

Fondita en 1909 de Aleksandr Saĥarov. Refondita en 1991.

Eldonas kaj administras: Halina Gorecka

Redaktas: Aleksander Korĵenkov

Konstantaj kunlaborantoj: Paweł Fischer-Kotowski (vicredaktoro), Peter Baláž, István Ertl, Irina Gonĉarova, Povilas Jegorovas, Wolfgang Kirschstein, Aleksej Korĵenkov, Floréal Martorell, Valentin Melnikov, Paŭlo Moĵajevo, Sergio Pokrovskij

Poŝta adreso: RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando

Retpoŝtaj adresoj: sezonoj@kanet.ru, sezonoj@yahoo.com

Retejoj: <http://esperanto-ondo.ru>, <http://sezonoj.ru>

Perantoj. Vidu la liston sur p. 68-69.

Abontarifo por 2019

Internacia eŭra tarifo: 15 eŭroj

Internacia dolara tarifo: 17 usonaj dolaroj

Pollando: 60 zlotoj

Ruslando kaj Belarusio: 850 ruslandaj rubloj

Anonctarifo

Plena paĝo: 50 eŭroj (3000 ruslandaj rubloj)

Duona paĝo: 30 eŭroj (1800 rubloj)

Kvarona paĝo: 15 eŭroj (900 rubloj)

Okona paĝo: 10 eŭroj (600 rubloj)

Triona rabato pro ripeto.

Donacoj: La donacoj estas danke akceptataj ĉe la redakcia adreso (ruslandaj rubloj) aŭ ĉe nia UEA-konto “avko-u” ĉe UEA.

Recenzoj: Bonvolu sendi du ekzemplerojn de la recenzota libro, kasedo, disko k. a. al la redakcia adreso.

Represo: Oni povas represi tekstojn kaj bildojn nur kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro kaj kun indiko de la fonto.

“La Ondo de Esperanto” (Волна эсперанто). 2019, №4 (294).

Ежемесячный журнал на языке эсперанто.

Журнал зарегистрирован Министерством Российской Федерации по делам печати, телерадиовещания и средств массовых коммуникаций. Свидетельство о регистрации ПИ №77-9723.

Учредитель и издатель: Горецкая Г. Р. Редактор: Корженков А. В.

Подписано в печать: 1 апреля 2019 г.

Bazaj informoj pri <i>La Ondo de Esperanto</i>	2
En ĉi tiu numero	3
Intervjuo	5
Przemysław Wierzbowski: Okupiĝi pri Esperanto ne nur silente... (Intervjuo de Paweł Fischer-Kotowski)	6
Eventoj	12
Tuomo Grundström. La prezidento de Finnlando estas la Alta Protektanto de la 104a UK	13
Tiina Oittinen. Finnlandanoj prepariĝis por la Universala Kongreso	13
Olga Shiliaeva reĝisoros la kongresan temon en Lahtio	15
Aleksander Korĵenkov. Ok kandidatoj por kvin lokoj en la Komitato de UEA	15
Bharat K Ghimire. Kulture kaj nature en Nepalo	16
Jürgen Wulff. Sabine Fiedler prelegis en Hamburgo	17
Rudolf Fischer. Bibliaj Tagoj en Mainz	18
Irina Gonĉarova. APERo numero 13, kredoj kaj miskredoj	19
Elektado de triono de la akademianoj	21
Jorgos. Kanto por kaj per Esperanto	22
Claude Nourmont. Kio okazas en Kvinpetalo	23
Povilas Jegorovas. Jubileo de Petras Čeliaskas	24
<i>Sepa kaj Asorti</i> koncertos en BET-55	26
Fransoazo instruos kaj koncertos en Panevėžys	27
BET-55: Tri prelegoj de Yves Nevelsteen	28
Programo de la 50a Jubilea Malferma Tago de la Centra Oficejo de UEA	29
Koncize (10 informoj)	30
Tribuno	31
Dennis Keefe. La Merkatiko-Mikso kaj Esperanto	32
Halina Gorecka. "Mi forveturis al Astana. Mi venis al Nur-Sultan"	40
Irina Gonĉarova, Jurij Smirnov. Dujariĝo de Esperanta poŝtinterŝanĝo	43
Francesco Maurelli. Subtenu TEJOn ĉe Junulara Forumo de UN	45
Arkivo	46
Aleksander Korĵenkov. Jubileoj kaj memordatoj en aprilo 2019	47
Halina Gorecka, Aleksander Korĵenkov. Raymond Schwartz – 125-jara	48
Kálmán Kalocsay. Rimportreto	50

Kulturo	51
Aleksander Korĵenkov. Nia libroproduktado: la 28a resumo	52
Halina Gorecka, Aleksander Korĵenkov. La ĉeĥa eldono de la biografia skizo pri Zamenhof	56
Nikolao Gudskov. Ĉu forgesi aŭ pardoni? (Recenzo: Sabine Dittrich. <i>Heredantoj de silentado</i>)	58
Halina Gorecka. Júlia Sigmond dankas (Recenzo: Júlia Sigmond. <i>Dankon</i>)	59
La unua numero de <i>Literatura Foiro</i> en la ora jubileo	61
Libroservo de UEA: bona debito en 2018.	61
Vi, Esperanto kaj Ĉinio... ..	62
Biblioteko de <i>La Ondo</i> (BibLO): Libroj ricevitaj en 2018.	63
Ricevitaj gazetoj	64
Mozaiko	65
Pri ĉielo kaj tero (Tradukis Kukucapa Nemaskovskaja)	66
István Ertl. Spritaj splitoj kaj preskeraroj.	67
Kiel aboni <i>La Ondon</i>	68
Reklamo	70

Sur la kovropaĝo estas domo en la strato Broniewskiego 23 en la centro de Bjalistoko. Laŭ mendo de Bjalistoka Kulturcentro/Centro Ludoviko Zamenhof la bildon kreis Maciej Szupica; la foto estis farita komence de oktobro 2018. (Foto: Stanisław Dobrowolski).

Ni en la reto:

La Ondo de Esperanto: <http://esperanto-ondo.ru/Ind-ondo.htm>

Abono 2018: <http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Elŝuteblaj libroj: <http://esperanto-ondo.ru/Libroj/Libroj.php>

Novaĵretejo La Balta Ondo: <http://sezonoj.ru/>

Radio Esperanto: <http://radio.esperanto-ondo.ru/>

Halina en FB: <https://www.facebook.com/halina.gorecka.3>

Aleksander en LJ (ruse): <http://sezonoj.livejournal.com/>

Ruslingva informretejo: <http://rusa.esperanto-ondo.ru/>

Intervjuo



En aprilo (Zamenhofa monato same kiel decembro) nia gasto estas Przemysław Wierzbowski, prezidanto de la Esperanto-Societo en la naskiĝurbo de Doktoro Esperanto. En la supra foto, farita de Nina Pietuchowska en la Bjalistoka Esperanto-libraro, li sidas inter Elżbieta Karczewska kaj la Siberia volontulo Viktor Lagutin.



Okupiĝi pri Esperanto ne nur silente...

Intervjuo kun Przemysław Wierzbowski

Ĉu Bjalistoko ludas specialan rolon en la Esperanto-movado?

Bjalistoko urbiĝis ĉefe danke al komercaj kontaktoj en Ruslanda Imperio, sed hodiaŭ ĝi estas iom for de la ĉefaj vojoj nodoj. Tial ne ofte oni “dumvoje” vizitas nin, kutime la urbo estas la celo mem.

Bjelostoko, gubernio de Grodno – tia duonlegenda Zamenhofa urbo, en kiu surstrate aŭdeblas multaj lingvoj, diversaj nacioj renkontiĝas ĉe Babelturo, pri kiu ĉiuj legis en biografioj de Zamenhof – ne plu ekzistas. Nu, ĝi ne malaperis, kiel kredis usona esperantisto iam mirigita, ke mi loĝas ĉi tie. Ĝi tamen estas preskaŭ tute unuece pola malgraŭ tio, kiel oni provas ĝin reklami. Tamen la nuna loĝantaro, kiun konsistigas ankaŭ sufiĉe granda, kelkdekdoma grupo de esperantistoj, ne forgesas pri la historia kultura heredaĵo kaj diverse ĝin popularigas.

Mi ĝojas, ke la lokon, en kiu naskiĝis Lazaro Ludoviko, regule vizitas esperantistoj el plej diversaj landoj. Ili kun kortuŝo kaj ĝojo diras, ke ili ĉiam revis promeni sur la stratoj, laŭ kiuj iris Zamenhof mem, vidi la naskiĝlokon, sperti kiagrade Esperanto ekzistas en la urba spaco. Tio ja donas al mi ian “forton misteran” por plu okupiĝi pri la lingvo – des pli, ke ne mankas homoj, kiuj pretas akompani min je tio.

Mi aŭdis, ke Bjalistoko baldaŭ havos novan ZEO-n...

Tio veras. Ĉiujare la urbo asignas ĉirkaŭ dek milionojn da zlotoj por la tiel nomata civitana buĝeto, kadre de kiu oni rajtas proponi financadon de diversaj tuturbaj kaj kvartalaj projektoj (modernigoj de stratoj, konstruoj de ludparkoj, urbaj dekoraĵoj ktp.). En 2017 inter la projektoj, elektitaj por la financado, troviĝis skulptaĵo Zamenhof – ne kiel kutime prezentata barbulo, sed juna knabo, kiu el la ĉefa placo, en kiu onidire naskiĝis la ideo de Esperanto, kuras laŭ la nuna stra-

to portanta lian nomon al sia loĝdomo. Fine venkis pli statika projekto. Nun oni instalas la skulptaĵon kaj junan Lazaron ni povos renkonti la 14an de aprilo, okaze de tradicia Esperanto-renkontiĝo. Pro la nuna intervjuo mi rekalkulis Zamenhof/Esperanto-Objektojn en Bjalistoko: se flankenlasi unuopajn salonojn kaj lokojn nur parte ligitajn kun la historio de nia afero, kaj konsideri nur “verajn” ZEOjn (stratojn, instituciojn, konstruaĵojn k. c.) – en Bjalistoko troviĝas jam pli ol dudek tiaj objektoj.

Rakontu pri la agadoj de Bjalistoka Esperanto-Societo (BES). Ĝi estas certe la plej forta Esperanto-centro en Pollando kaj ankaŭ, se oni rigardas tutmonde, ĝi estas inter la plej elstaraj.

Sendube dum jaroj, danke al diversaj engaĝitaj homoj, ĝi iĝis sufiĉe signifa centro sur la esperantista mapo de Pollando. La agado de BES koncentriĝas, ja, pri Esperanto. Lingvokursojn ĉe diversaj niveloj ĉiujare en nia sidejo finas ĉirkaŭ 30 homoj; dankon al Iwona Kondraciuk kaj Mariola Pytel, kiuj instruas la lingvon en niaj senpagaj kursoj. Nia sidejo, iama sinagogo, utilas por aŭskulti

Post la fino de Esperanto-kurso en 2017 (Foto: Nina Pietuchowska)



prelegojn, kune kuiri kaj praktiki la lingvon. Ĝi estas gastejo de la Pasporta Servo kaj muzikekzercejo de du ensembloj, kun kiuj ni kunlaboras de pluraj jaroj kaj kiuj koncertas dum Esperanto-aranĝoj: la klezmera *Frey-Lech Trio* kaj la infana *Uku-Donaco Bjalistoko*.

BES estas tre aktiva je eldonista kampo kaj produktas po kelkajn librojn jare. Preskaŭ ĉiun fojon ni eldonis la libron de la nacia legado (*La pupo* de Prus, *Antaŭprintempo* de Żeromski k. a.). Mi ofte kontribuas al tio per librokovriloj, Tomasz Chmielik per tradukoj kaj Josip Pleadin kompostas la tekstojn, sed la teamon konsistigas ankaŭ aliurbaj kaj alilandaj samideanoj. Kiam pasintjare Centro Ludoviko Zamenhof (CLZ) petis min helpi fari ekspozicion de Esperanto-eldonaĵoj el Bjalistoko, la longa listo de ĝisnunaj verkoj min mirigis.

De dek jaroj ni invitas junajn eŭropajn volontulojn, kiuj helpas organizi aranĝojn kaj gvidi kursojn. Mia sperto pri la volontula programo de Erasmus+ estas tre pozitiva kaj al ĉiu asocio mi rekomendas interesiĝi pri nuna Eŭropa Solidareca Korpuso, kiu ebligas dum kelkaj monatoj havi ĉiam pretan, junan laboriston. Nia nuna volontulo estas Viktor Lagutin el la fora Ĥabarovsko, sperta

Antaŭprintempo de Stefan Żeromski estis eldonita por la nacia legado en 2018 en la traduko de Tomasz Chmielik (Foto: Przemysław Wierzbowski)



lingvisto, kiu, same kiel la antaŭuloj, vizitas lernejojn kun prelegoj, instruas nian lingvon kaj ĝenerale aktivigas la asocion.

Ni bone kunlaboras kun lokaj institucioj. En la sidejo de CLZ ni regule organizas niajn aranĝojn – Zamenhofan naskiĝtagon, etajn kursojn de Esperanto, prezentojn de eldonaĵoj k. c. Kun Podlaĥia Libraro, la regiona biblioteko, ni dum jaroj eldonis librojn kaj kune organizas ĉiujaran literaturan konkurson de prozo – la verkojn oni kolektas en paperaj *Bjalistokaj kajeroj*. Gravega subtenanto kaj kunorganizanto de diversaj iniciatoj estas Elżbieta Karczewska, kiu nun laboras en Esperanto-Libraro kaj kunordigas esperantumadon flanke de Podlaĥia Libraro.

Nia plej grava aranĝo estas Bjalistokaj Zamenhof-Tagoj, al kiuj ĉi-jare ni invitas jam por la 20a fojo (13-15 de decembro). En ĝi estas prelegoj pri Esperantaj temoj, koncertoj ne nur en Esperanto, ekskurso, naskiĝkuko de LLZ. Ĉiam novaj kontribuoj estas bonvenaj.

Krom strikte Esperantaj aferoj, ekde 2009 ni organizas Bjalistokan Lingvo-kafejon – regulajn renkontiĝojn, en kiuj oni povas en malstrikta etoso ĉe kafeja tablo praktiki lingvojn de la mondo. Alia grava celo, kiun ni penas popularigi, estas, ke la renkontiĝoj servu interkone por lokaj minoritatoj kaj eksterlandanoj, kiuj serĉas sialingvanojn. Post jaroj da vagado tra diversaj lokoj, danke al la kunlaboro kun Bjalistoka Kulturcentro, la projekto havas sian fiksitan ejon. La renkontiĝojn ofte akompanas prezentaĵoj pri aliaj kulturoj kaj lingvoj.

La asocio samtempe havas siajn malfortaĵojn; ni neniam funkciigis regulan libroservon kaj vendas esperantaĵojn ĉefe loke kaj ekspedas malofte; la nombro de novaj membroj – kiel kutime en nia movado – apenaŭ kreskas, kaj la aktivularo ĉefe konsistas el la “malnova stabo”, pro kio mankas iom da freŝaj organizad-ideoj.

Ankaŭ multo estas farenda je diskonigo de la lingvo mem inter la loĝantoj – ordinara bjalistokano scias nur supraĵe, kiu estis Zamenhof aŭ kio estas Esperanto, la informadon eblas plibonigi, ankaŭ eldonante informilon aŭ instruilon.

Ĝi estas demonstra versio de la 74-paĝa aprila *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Eventoj



La juna Moskva esperantisto Petro Fedosov estis inter la ĉefaj kontribuintoj al la programo de la 13a AntaŭPrintempa Esperanto-renkontiĝo, kiun la asocio MASI okazigis komence de marto apud Moskvo. (Foto: Irina Gonĉarova)

La prezidento de Finnlando estas la Alta Protektanto de la 104a UK

Universala Kongreso de Esperanto okazis en Finnlando trifoje: la 14a en Helsinko en 1922, la 54a ankaŭ en Helsinko en 1969, la 80a en Tampere en 1995. Ĉi-jare okazos la 104a UK en Lahti je unu-hora distanco de Helsinko.

En ĉiu antaŭa UK la Alta Protektanto estis la respublika prezidento: en 1922 Kaarlo Juho Ståhlberg, la unua prezidento de la tiam nur trijara sendependa respubliko; en 1969 Urho Kekkonen, la plej longe oficinta Finnlanda prezidento; kaj en 1995 Martti Ahtisaari, gajninta tiujare la Zamenhof-premion de UEA por internacia kompreniĝo. En la 104a UK en Lahti la Alta Protektanto estos la nuna respublika prezidento Sauli Niinistö.

Sauli Niinistö naskiĝis la 24an de aŭgusto 1948. Li estas la dek-dua prezidento en la historio de respubliko Finnlando, oficanta ekde marto 2012. Profesie advokato, Niinistö estis unuafoje elektita en la parlamenton en 1987. Li estis prezidanto de la partio Nacia Koalicio (1994-2001), ministro de justico (1995-1996), ministro de financoj (1996-2003), vicĉefministro (1995-2001). Dum lia prezidanteco de Eŭropa Demokrata Unio (EDU, 1998-2002) ĝi unuiĝis kun Eŭropa Popola Partio, kies honora prezidanto li estas. Post la laboro kiel vicĉefdirektoro de Eŭropa Investa Banko (2003-2007) li revenis al Finnlando kaj estis elektita en la parlamenton kaj estis ĝia prezidanto (2007-2011). Duafoje kandidato, en 2012 li fariĝis la 12a prezidento de Finnlando kaj estis kun granda plimulto reelektita en 2018.

Sauli Niinistö vidviĝis en 1995, restinte kun du filoj tiam 15- kaj 20-jaraj. Lia dua edzino ekde 2009 estas la verkistino Jenni Haukio (1977-), ilia filo Aaro naskiĝis en 2018.



Tuomo Grundström

Ĝi estas demonstra versio de la 74-paĝa aprila Ondo. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn. Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

APERo numero 13, kredoj kaj miskredoj



La 7-10an de marto, rando de la apudmoskva urbo Zvenigorod, Moskva Esperanto-Asocio MASI la 13an fojon okazigis sian tradician senkrokodilan AntaŭPrintempan Esperanto-renkontiĝon (APERo).

Estas ĉiam malfacile rakonti pri ampleksa renkontiĝo kun dekoj da interesaj programeroj kaj multaj karaj homoj ... Kion

elekti? Kiel priskribi abundajn impresojn, kiel transdoni konstantan senton de festo, de kio komenci?

Plej facilas komenci de sekaj faktoj. Estu la statistiko.

Partoprenis 35 esperantistoj kaj 4 familianoj-neesperantistoj, kiuj nur fragmente kaj silente ĉeestis la programon. 21 homoj estas loĝantoj de Moskvo kaj Moskva regiono, 13 venis el aliaj regionoj de Ruslando (Arĥangelsko, Jaroslavlo, Jekaterinburgo, Granda Novgorodo, Novoĉerkassko, Penzo, Sankt-Peterburgo, Taganrogo, Volgogrado, Uljanovsko), kaj unu el la ĉefurbo de Latvio. Ĉeestis 15 inoj kaj 20 viroj. 10 gejunuloj aĝis inter 14 kaj 35 jaroj, la plej juna ĉeestanto estis kvarmonata, la plej aĝa partoprenantino estis 76-jara. Sen kalkuli familianojn-neesperantistojn inter ni estis 11 unuafojaj APERo-partoprenintoj, 22 fluparolantoj, 11 parolantoj kaj 2 ekparolantoj. La lingva disciplino floris!

Nun kelkaj vortoj pri la programo.

APERo daŭre kaj kun plia profundiĝo inklinas al klerigaj programeroj. En la kutimaj esperantistaj aranĝoj oni nomas tiujn Somera Universitato, sed ni ne havas tiajn ambiciojn (pli ĝuste: ni ne havas fakulojn por fari universitatnivelaĵajn prelegojn). Necesas nomi aferojn per konvenaj nomoj. Ni nomu tion – ĝenerala klerigejo (ĜEK).

La temo de tiu ĉi APERo, havanta la mistikan numeron 13, estis “Kredoj kaj miskredoj”. Ĝi invitis programerojn pri superstiĉoj kaj eksterraciaj konvinkoj, abundaj en nia ĉiutageco kaj ĝenerala mondpercepto. Elektante la temon, ni troviĝis sub la influo de la nombro 13 kaj de scienc-popularaj libroj, prelegoj kaj filmetoj. Rezulte ni ekhavis kelkajn pensigajn programerojn, ekzemple: tujan intrepredadon de la film-prelego de Aleksandr Panĉin “Eliro el la korpo kaj apudmorta sperto” <https://www.youtube.com/watch?v=be35irl2Kv8>

Ĝi estas demonstra versio de la 74-paĝa aprila Ondo. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

BET-55: Tri prelegoj de Yves Nevelsteen



Yves Nevelsteen naskiĝis en 1974 en Belgio. Li estas tradukisto, eldonisto kaj volontulo ĉe Flandra Esperanto-Ligo. Li estas iama prezidanto de Flandra Esperanto-Junularo, verkinto de plurlingva vortaro *Komputeko* pri komputilaj vortoj, manlibroj pri Vikipedio kaj diversaj praktikaj broŝuroj pri komputilaĵoj. Yves instruas Esperanton al progresantoj en Benelukso kaj gvidas paroligajn rondojn. Li provlegas librojn por “Eldonejo Libera” kaj konsilas diversajn tradukantojn de programoj kaj retejoj.

Kadre de BET-55 en Panevėžys Yves Nevelsteen faros tri prelegojn, kiujn li mem jene prezentas:

1) Oftaj eraroj kaj novaj vortoj en Esperanto

Yves Nevelsteen ekde 2007 okupiĝas pri komputilaj vortoj en Esperanto kaj sekvas la evoluojn, provlegante tradukojn de komputilaj programoj, retejoj, aplikaĵoj ktp. Li ankaŭ regule mem tradukas, ekzemple Facebook al Esperanto. Tiel ĉi ekstis dokumento “Atentigoj pri tradukado”, en kiu aperas krom oftaj eraroj ankaŭ novaj tendencoj en la lingvouzo.

2) Bitlibroj kaj bitgazetoj en Esperanto

“Eksterrete” estas projekto de Yves Nevelsteen per kiu li celas prezenti interretajn indaĵojn. Volumo 2 de lia verko temas pri bitlibroj kaj bitgazetoj. Yves klarigos, per kiuj aparatoj oni povas legi ilin kaj kie trovi legindaĵojn – ofte senpage.

3) 200+ Esperantaj markonomoj en Benelukso

Pli ol 200 beneluksaj firmaoj kaj asocioj konscie uzas nomon en Esperanto. Temas ekzemple pri Amikaro, Flegado, Hejmen, Infano, Konsilo, PacoŜako, Ripozo, Ŝanĝo, TroviSolvon kaj ViroModo. Yves Nevelsteen faris studon pri la temo kaj kompilis libron 120-paĝan, en kiu aperas krom la konfirmataj ankaŭ 300 nekonfirmataj nomoj. Li komencis per nederlandlingva eldono, ĉar la celo estas fari projekton per la verko; firmaoj kaj asocioj kiuj uzas nomon en Esperanto estu niaj ambasadoroj! Estas fascine kial kaj kiel multaj homoj nuntempe elektas nomon en Esperanto por sia agado. Vi ekscios ĉion dum la prelego de Yves.

Pliaj informoj pri BET-55 estas troveblaj en la novaĵretejo La Balta Ondo:
<http://sezonoj.ru/bet55/>

Ĝi estas demonstra versio de la 74-paĝa aprila Ondo. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Tribuno

único en el mundo **9 días** para tu pasión

FESTIVAL de los SENIORS **+50**

PARTICIPA

Portrait of a man in a grey suit jacket and light blue shirt.

Ĉi-kajere Dennis Keefe, laŭreato de la honora titolo La Esperantisto de la Jaro 2011, revenas al sia temo “Merkatiko kaj Esperanto”. Komentoj estas bonvenaj.

La Merkatiko-Mikso kaj Esperanto

Se vi legis kelkajn el miaj artikoloj en *La Ondo de Esperanto* en la serio “Merkatiko kaj Esperanto”, vi scias, ke merkatiko estas iom da scienco kaj multe da arto, kies principoj tuŝas la informadan kaj varban parton de la Esperanto-movadoj. Sed informado, varbado kaj komunikado estas fakte nur parto de merkatiko kaj per si mem ne sufiĉas por efektiviigi bonan strategion. Pli vasta kaj pli utila instrumento por kompreni kaj realigi merkatikajn taskojn estas la koncepto nomata Merkatiko-Mikso, kiu montras la kernajn, nemalhaveblajn partojn de kohera pensado kaj planado por merkatikaj celoj.

HISTORIA FONDO


La Merkatiko-Mikso (mi uzos ĉi-artikole la modifitan akronimon MEMO¹), koncepte naskiĝis en la 1950aj jaroj de la nun klasika verko de Wendell Smith, publikigita en la faggazeto *Journal of Marketing*. En tiu artikolo, Smith kritikis la klasikan ekonomikan supozon, ke merkatoj estas homogenaj kaj ne respegulas la realon. Merkatoj estas heterogenaj, kaj do ili bezonas malsaman aliron de la firmaoj aŭ organizoj kiuj partoprenas en ili.

Post tiu publikaĵo la ideoj de Smith ekestis en la fama magistra programo de Harvardo (MBA de la Harvard Business School), de kie per abundo da lerte skribitaj kazo-studoj², en kiuj MEMO rolis ofte kiel ĉefa aŭ sekundara konceptilo, MEMO disvastiĝis tra aliaj universitatoj kaj tra la mondo de firmaoj kaj ĉiaj organizoj. Hodiaŭ ĉiu studento de komerco, kaj ĉiu organizo bone konas kaj laŭsituacie utiligas tiun koncepton.

MEMO utilas al porprofitaj firmaoj, sed ankaŭ al ĉiu organizo kiu ofertadas varon aŭ servon al ekstera publiko. Tio estas la kazo de multe da esperantaj eventoj kaj agadoj, kaj MEMO povas esti uzata de ni por pli bone pripensi kaj plibonigi multan, ekster-direktan agadon.



KVAR ELEMENTOJ DE MEMO



El kio konsistas la Merkatiko-Mikso? MEMO konsistas el kvar ĉefaj elementoj, kaj ĉiuj el tiuj elementoj povas siavice subdividiĝi en diversajn subpartojn, subspecojn. La unua elemento, kiu estas la plej kerna, fundamenta, estas la varo aŭ servo mem³. Due, estas la informado⁴ pri tiu varo-servo, ofte en la formo de simpla komunikado. Trie, estas la distribuado (la loko, la vendo-vojo, la maniero), tra aŭ per kiu la varo-servo estas liverata, kiel tra vendejo aŭ eventejo, ekzemple. Kaj

finfine estas la prezo de la varo-servo, aŭ pli bone konceptata, la valoro kune kun la rilato inter la mona kaj psika kosto kune kun la mona aŭ psika profito de la afero. Eblas resumi dirante: varo aŭ servo, informado aŭ komunikado, distribuado aŭ loko, kaj prezo aŭ valoro.

VARO-SERVO

La unua elemento de MEMO estas la produkto aŭ servo. En Esperantujo la plejparto de nia agado estas servoj: kursoj por lerni Esperanton, landaj kaj universallaj kongresoj, loĝado-servo nomata Pasporta Servo, eĉ komuna transportado de esperantistoj tra Ruslando per la transsiberia trajno. Ankaŭ estas kelkaj konkretaj produktoj, ekzemple libroj, revuoj kaj eĉ novaĵ-leteroj.

Substrekindas, ke kiam ni pensas pri iu varo aŭ servo en Esperantujo, gravas, ke ni ne pensu tiom pri la varo-servo mem, sed pri la bezonoj kaj la motivoj de la homoj kiuj uzas tiun varo-servon. Ĝuste kial ili eklernas Esperanton? Ĝuste kial ili membrigas en loka asocio? Ĝuste kial ili ĉeestas aŭ ne ĉeestas Universalan Kongreson? Sen koni profunde tiajn bezonojn aŭ motivojn, malfacilas oferti la ĝustan varo-servon kaj informi pri ĝi, varbi pri ĝi. Oni devas laŭeble ĝisfunde koni la klienton.

Rimarku, ke la termino “samideano” ne kaptas la nuancojn kiujn ni bezonas priatenti por sukcese antaŭenigi Esperanton. Ĉiuj grandaj grupoj povas subdividiĝi en pli malgrandajn subgrupojn, kaj en merkatiko tiuj subgrupoj nomiĝas segmentoj. Ĉiu segmento elektita kiel celgrupo devas, laŭ merkatikaj principoj, havi sian apartan Merkatiko-Mikson. Kelkfoje nur unu elemento en MEMO ŝanĝiĝas por adaptiĝi al malsama celgrupo, kelkfoje pliaj elementoj, kelkfoje ĉiuj. Konkret-ekzemple, tiaj ŝanĝoj videblas en UEA-membreco: diversaj servoj (papera aŭ reta revuo, ekzemple), diversaj prezoj de membreco, diversaj distribuoj (poŝta, bita).

INFORMADO

Se iu varo-servo estas tre bona, altkvalita, eĉ preskaŭ perfekte adaptita al sia merkato, tio, laŭ la principoj de MEMO, ne sufiĉas por sukceso. Ĉiuj el la kvar elementoj

de MEMO (varo-servo, informado, distribuado kaj prezo) ludas rolon, kaj devas bone koheri por fruktodone efiki. Kaj el tiuj aliaj tri elementoj, unu el la plej gravaj estas informado.

Informado estas ĝenerala vorto, kaj pensigas nin pri rilataj konceptoj kiaj komunikado, konvinkado, varbado, reklamado, propagando, kaj ankaŭ pri publikaj rilatoj kaj vendado kun profesiaj vendistoj. Informado ludas ŝlosilan rolon por la disvastigo de Esperanto, kaj laŭ kelkaj homoj, inkluzive min, informado devas ludi centran rolon en la Esperanto-movadoj.

Notu, ke ĝuste kiel eblas pensi pri la Merkatiko-Mikso kun ĝiaj subpartoj, eblas ankaŭ pensi pri ia Informado-Mikso, kiu siavice konsistas el kvin ĉefaj subpartoj: reklamado, anoncado, promociado⁵, publikaj rilatoj kaj vendado. La Informado-Mikso dependas de la celgrupoj elektitaj, la budĝeto de la organizo por informado, kaj pluraj aliaj kriterioj.

Reklamado

Antaŭ la erao de Interreto kaj antaŭ sociaj medioj, kiel Fejsbuko, la uzo de reklamado, difinita kiel anonco pagita, estis eble la plej malbona elekto por Esperantaj celoj. Estas ekzemploj de esperantistoj, en la 1980aj jaroj, kiuj pagis la ekvivalenton de miloj da eŭroj por pagita anonco en televid-programa gazeto por atingi nur unu aŭ du kliento-reagojn. Komparu tiun rezulton kun la uzado de eble kvin eŭroj por surglui afiŝojn de formato A4 sur muroj en Madrido en la jaro 1980, kio altiris ĝis cent kliento-reagojn kaj 35 novajn gelernantojn en nova kurso de Esperanto. Mi bone scias pri tio, ĉar mi estis unu el tiuj kiuj legis tiun afiŝon, informiĝis pri la kurso, kaj finfine aliĝis kiel lernanto!

Tamen en la nuntempa epoko eblas aĉeti reklamojn en sociaj medioj je tre malalta prezo, kiu eĉ povas esti same malmultekosta kiel tiu de simpla, papera afiŝado. Estas jam kelkaj promesplenaj rezultoj de tia, reta afiŝado. La ĝenerala koncepto en Merkatiko, kiu budĝete enkadrigas tian agadon, rilatas al tio: ĉu la profito (kliento-reagoj, aliĝoj en kursoj kaj similaj) estas pli granda ol la kosto? Se jes, daŭrigu kaj kreskigu vian investon en tia informado, kaj se ne, serĉu alian manieron realigi la informadon. Ĉu reklami papere, ĉu socio-médie, ĉu ambaŭ kune, ĉu alimaniere – la tuto dependas de la rilato inter rezultoj kaj kostoj.

Ĝi estas demonstra versio de la 74-paĝa aprila *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn. Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

“Mi forveturis al Astana. Mi venis al Nur-Sultan”

En la sociaj retoj oni ŝercas pri vojaĝoj al Nur-Sultan

La surpriza informo pri tio, ke la ĉefurbon de Kazaĥstano oni alinomos al Nur-Sultan – honore al la unua prezidento Nursultan Nazarbajev (Нұрсұлтан Әбішұлы Назарбаев) – naskis multajn ŝercojn kaj anekdotojn en la sociaj retoj kaj inter la lokanoj. La plej populara ŝerco estis pri vojaĝoj: “Mi forveturis al Astana. Mi venis al Nur-Sultan”. Tio ne estas nur ŝerco, ja la Ruslanda futbalteamo flugis al Astana por matĉo kontraŭ Kazaĥstano en Eŭropa kvalifiko 2020 (cetere, Ruslando gajnis per kvar senrespondaj goloj), sed ĝi reflugis hejmen jam el Nur-Sultan.

La 105-metra monumento Bajterek (kreskanta arbo) estas unu el la ĉefaj vidindaĵoj de la Kazaĥstana ĉefurbo (Foto: Halina Gorecka)



“Mi opinias, ke nomi la urbon Nursultan estas tro familiare, – rezonas uzanto en Tvitero. – Necesas io pli respekta. Tial mi proponas alinomi Astana je Nursultan Abiŝeviĉ”. (En Ruslando kaj en multaj ekssovetuniaj ŝtatoj aldoni de la patronomo estas signo de respekto.)

Oni elpensas novajn nomojn por Moskvo kaj Minsk:

“La nova prezidento de Kazaĥstano proponis alinomi Astana je Nursultan. Ni alinomu Moskvon je Vladimir. Nu, Vladimir jam ekzistas (malnova rusa urbo – rim. de la aŭtoro), mi ne scias, en ion alian”.

“La nova prezidento de Kazaĥstano proponis alinomi Astana je Nursultan. Ŝajnas, ke en la proksima estonto Minsk iĝos Aleksandrio”.

Por tiuj, kiuj ne scias, aŭ forgesis la eventon, mi memorigas, ke Kasym-Ĵomart Tokajev (Қасым-Жомарт Кемелұлы Тоқаев), kiu iĝis prezidento de Kazaĥstano post la demisio de Nursultan Nazarbajev, proponis alinomi la ĉefurbon de Kazaĥstano. La 23an de marto dekreto pri alinomigo estis subskribita.

Kion signifas la nomo Nur-Sultan?

La nova nomo de la Kazaĥstana ĉefurbo estas skribata en la kazaĥa kun streketo – Nur-Sultan. En la araba “nur” signifas “lumo”, ankaŭ en la moderna kazaĥa “nur” (нұр) signifas “lumo”, “lumradiado”, “sunradio”. La nomo Nur simbole signifas helan, sunan homon. Ĝi estas uzata kiel memstara nomo, ankaŭ kiel prefikso por viraj kaj virinaj nomoj (Nursultan, Nurullaĥ, Nurali, Nurbaj, Nurbek...). La vorto “sultan” signifas potencon, aŭtoritaton. Donante al knabo la nomon Sultan oni deziris al li riĉan kaj dignan vivon de sendependa reganto. Malkiel la homnomo Nursultan, la urbonomo estas skribata kun streketo: Nur-Sultan. Ĉu Nur-Sultano en Esperanto?



Malgraŭ la nomŝanĝo la loĝantoj de la ĉefurbo restos astananoj. La pasportoj, naskiĝ- kaj geedziĝ-atestoj kun la urbonomo Astana restos validaj.

La antaŭaj nomoj de la nova ĉefurbo

Astana estas kutime nomata la nova ĉefurbo, kontraste al Alma-Ata, la antaŭa ĉefurbo, ricevinta la epiteton “dua ĉefurbo” aŭ “suda ĉefurbo”. Ĝi estas alinomata ne la unuan fojon.

Ĝi estas demonstra versio de la 74-paĝa aprila *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Arkivo



Antaŭ kvin jarcentokvaronoj, la 8an de aprilo 1894 enmondiĝis Raymond Schwartz (familinomo kun sep konsonantoj kaj unu vokalo), bankisto kaj *ĉarma an' de Epikur'*, la plej ridiga el ĉiuj Esperantaj humoristoj kaj aŭtoro de la tutserioza romano *Kiel akvo de l' rivero*. Legu pri li en ĉi-monata rubriko “Arkivo”, sed legu ankaŭ liajn verkojn leĝerajn kaj seriozajn.

Jubileoj kaj memordatoj en aprilo 2019

1. Antaŭ 75 jaroj naskiĝis **Gerrit Berveling** (1944-1972-), nederlanda instruisto, remonstranta pastoro k e-isto; prezidanto de la landa asocio Eo Nederland (2009-12), membro de AdE (1989-), prezidanto de EVA (1993-2003), la lasta redaktoro de *Fonto* (1993-2006); unu el plej fekundaj E-aŭtoroj (82 libroj originalaj k tradukitaj); laŭreato de la OSIEK-premio pro la kvinvoluma *Antologio Latina* (2003). — Legu pli en NDK, p. 35-36.

2. Antaŭ 15 jaroj mortis **Adolf Burkhardt** (1929-1946-2004), germana luterana pastoro k e-isto; prezidanto de KELI (1961-75, 1981-2000), tradukinto de multaj kristanaj kantoj, kunkompilinto de la ekumena preĝ- k kant-libro *Adoru* (2001), iniciatinto k la unua direktoro de Germana E-Biblioteko (1989-2004); laŭreato de la E-Kulturpremio de FAME pro *Adoru* (2002), honora membro de UEA (2003). — Legu pli en NDK, p. 50-51.

7. Antaŭ 100 jaroj naskiĝis **Violin Oljanov** (1919-1933-1998), bulgara ĵurnalisto, filologo k e-isto; sekretario k vicprezidanto de BEA (1955-64), prezidanto de IUEF (1963-94), redaktoro de *Bulgara E-isto* (1957-64), *Filologo* (1974-91) k *Paco* (1976-89), aŭtoro de kelkaj E-libroj k pli ol mil artikoloj pri/en Eo, membro (1986-98) k vicprezidanto (1989-95) de AdE. — Legu pli en NDK, p. 219-220.

8. Antaŭ 125 jaroj naskiĝis **Raymond Schwartz** (1894-1909-1973), bankoficisto k e-isto; la ĉerfa figuro en la E-kabaretoj *La Verda Kato* (1920-25), *La Bolanta Kaldrono* (1933-39), *La Tri Koboldoj* (1949-56); redaktoro de la satira gazeto *La Pirato* (1933-35), aŭtoro de humuraj k satiraj novelaroj k poemaroj k de la romano *Kiel akvo de l' rivero* (1963). — Legu pli en NDK, p. 249-251.

8. Antaŭ 80 jaroj naskiĝis **Christer Kiselman** (1939-1980-), sveda matematikisto, membro de Reĝa Sveda Scienca Akademio (1990) k e-isto; membro (1989-2015), vicprezidanto (1998-2004) k prezidanto (2013-15) de AdE, dekano de la sekcio por strukturaj sciencoj de AIS (2017-19), vicprezidanto de ISAE (1986-93); ĝenerala sekretario de Akademio Comenius (1986-); aŭtoro de studoj, artikoloj k recenzoj pri fakaj k esperantologiaj temoj; fondinto k redaktoro de *Esperantologio / Esperanto Studies* (1999-2018), rektoro de IKU en du UKoj (2003, 2011). — Legu pli en NDK, p. 156-157.

15. Antaŭ 115 jaroj naskiĝis **Gurgen Sevak** (Grigorjan, 1904-1921-1981), armena sovetunia filologo k e-isto; prezidanto de Armenia E-ista Unio (de 1925), sekretario de la Armenia Komitato de SEU, prezidanto de la E-komisiono ĉe la Armena Societo por Amikeco k Kulturaj Ligoj kun Eksteraj Landoj (1965-79) k de Armenia Filio de ASE (1979-81), aŭtoro de E-lernolibro por armenoj (1930). — Legu pli en NDK, p. 257-258.

28. Antaŭ 15 jaroj mortis **Egidius Wensing** (1913-1930-2004), nederlanda entreprenisto (direktoro de unu el la tri sekcioj de *Philips*), kunfondinto k prezidanto de Instituto por Eo en Komerco kaj Industrio, tradukinto de kelkaj reklamaj broŝuroj de *Philips*, vicprezidanto de UEA (1962-72, 1974-77), la unua prezidanto de Instituto Hodler '68 (1968-72). — Legu pli en NDK, p. 299-300.

Aleksander Korĵenkov

Raymond Schwartz – 125-jara

Antaŭ 125 jaroj, la 8an de aprilo 1894 en la urbo Metz en la regiono Alzaco-Loreno, kiu post la Francia-Prusia milito (1870-71), estis teritorio de la reunuigita Germana Imperio, naskiĝis Alfred Raymond Schwartz. Liaj gepatroj estis Jean Michel Schwartz kaj Marie Sement, ambaŭ franclingvaj.

Dum la Unua Mondmilito Raymond Schwartz estis mobilizita al la armeo de Germanio kaj deĵoris en la orienta fronto. Post la fino de la milito Schwartz revenis al Metz, kiu jam ekapartenis al Francio, ricevis la civitanecon de Francio kaj baldaŭ ekloĝis en Parizo, laborante ekde 1920 kiel bankoficisto (escepte de kelkmonata servo en la Francia armeo kiel kanonisto komence de la Dua Mondmilito) ĝis sia emeritiĝo kiel kundirektoro de grava banko en Parizo.

Siajn lastajn vivojarojn Schwartz loĝis en Courbevoie (nordokcidenta apudurbo de Parizo), pasigante la somerojn en la gepatra domo en la vilaĝo Secourt (departemento Mozelo). Li mortis la 14an de majo 1973 en Parizo pro pulma kancero kaj estis sepultita en la familia tombo en la vilaĝo Moncheux (Mozelo).

Raymond Schwartz estis lingvolernema, li sciis la francan, germanan, latinan, grekan, anglan, hispanan, italan kaj Esperanton, kiun li eklernis en 1909. En 1911 la 17-jara Raymond vizitis Barcelonon, kie antaŭ du jaroj okazis la 7a Universala Kongreso de Esperanto; en 1912 li aperigis sian unuan Esperanto-poemon en *Tutmonda Espero* (Hispanio); en 1913 fondis Esperanto-grupon *Amika Rondo* en Metz.

Post la Unua Mondmilito Schwartz fondis en Parizo junularan Esperanto-grupon kun la sama nomo *Amika Rondo*, kiu transformiĝis al la kabaredo *La Verda Kato*, kiun li gvidis dum 1920-25. Ekde 1933 ĝis la Dua Mondmilito li animis la kabaredon *La Bolanta Kaldrono*, fonditan de Jozeph Nels, post la Dua Mondmilito li kunfondis kaj gvidis la kabaredon *La Tri Koboldoj* (1949-56), kiu ĉiumerkrede prezentis programon en Montmartro.

La poezia materialo de *La Verda Kato* aperis libroforme kiel *Verdkata testamento* (1926), pluraj eroj el *La Bolanta Kaldrono* estis publikigitaj en *La ĝoja podio* (1949). Inter liaj libroj estas ankaŭ *Prozo ridetanta* (1928), *Anni kaj Montmartre* (romaneto, 1930), romano *Kiel akvo de l' rivero* (1963), konsiderata kiel unu el la plej gravaj Esperanto-romanoj, lingva studo *Ne kiel Meier!* (1964), novelaro *Vole ... novele* (1971) kaj kolekto *... kun siaspeca spico!* (1971) kiu enhavis, i.a., ĉiujn tekstojn el lia kolumno "Laŭ mia ridpunkto" pri ĉefaj eventoj de la jaro, kiu dum dudek jaroj aperis en *Sennacieca Revuo*.

Ĝi estas demonstra versio de la 74-paĝa aprila Ondo. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Kulturo



Libroj estas en la fokuso de nia aprila kultur-sekcio. Temas pri libroj surmerkatigitaj en 2018, libroj venditaj de la libroservo de UEA, libroj ricevitaj de nia biblioteko, libroj recenzitaj de niaj kunlaborantoj. (La supra foto el la Lisbona libroservo estas farita de Anna Striganova.)

Nia libroproduktado: la 28a resumo

Ekde sia renaskiĝo *La Ondo* ĉiujare publikigas statistikon de la libroproduktado en Esperantujo, daŭrigante la iniciaton de Vilmos Benczik, kiun li komencis en la Budapeŝta revuo *Hungara Vivo*. Por tiuj, kiuj unuafoje abonas *La Ondon*, ni ripetu kelkajn enkondukajn frazojn, kiujn prefere ne legu niaj konstantaj abonantoj.

La bazo de nia statistiko estas la rubriko “Laste aperis” en la revuo *Esperanto*, en kiu estas registrataj ĉiuj libroj, kiujn la libroservo de UEA ekvendis en la aktuala jaro. La jartabelojn akompanas resumaj tabeloj por la 28-jara periodo de nia statistikado (1991-2018).

Tia statistiko ja estas kritikebla kaj kritikinda.

Unue, en “Laste Aperis” estas pluraj libroj, eldonitaj antaŭ kelkaj jaroj sed ekvenditaj de UEA en la koncerna jaro, ekzemple, ĉar la eldoninto ne tuj post la eldono sendis specimenon al Roterdamo. Tio povas doni misan bildon pri la revuata jaro. Sed la resuma statistiko glatigas la fluktadon kaj fidine vidigas la ĉefajn tendencojn en nia eldonado.

Due, la libroservo de UEA vendas ne ĉiujn novajn Esperanto-librojn, kaj en “Laste Aperis” kutime mankas, ekzemple, lerniloj eldonitaj por landaj bezonoj (ekzemple, lernolibroj por ĉinoj) kaj etkvante eldonitaj broŝuroj, kiujn la aŭtoroj disvendas kaj disdonacas en siaj kluboj kaj lokaj renkontiĝoj. Same mankas en “Laste Aperis” kongreslibroj, programbroŝuroj kaj jarlibroj, kiuj abunde aperas ne por vendado en libroservoj, sed por disdono al la respektivaj kongresanoj kaj asocioj.

Trie, ekster la statistiko restas la bitlibroj, kiujn la aŭtoroj (kutime, senpage) ofertas en la virtuala mondo sen zorgi pri papera eldono por ne pagi la eldonkostojn. Tio reduktas la rikolton de libroj paperaj. Sed ne estas pli granda statistika bazo ol la kritikebla “Laste Aperis”.

Magra jaro 2018a

Jaro	Libroj	Paĝoj	Jaro	Libroj	Paĝoj
1991	222	26.091	2005	159	23.780
1992	205	25.789	2006	204	30.078
1993	136	18.511	2007	184	31.183
1994	188	22.078	2008	158	25.381
1995	200	23.345	2009	158	24.272
1996	232	28.637	2010	204	28.232
1997	273	27.727	2011	172	19.775
1998	208	28.769	2012	153	23.144
1999	208	24.460	2013	178	25.344
2000	235	25.869	2014	107	14.024
2001	222	31.520	2015	172	25.629

2002	174	26.451	2016	189	32.323
2003	224	28.424	2017	139	23.353
2004	183	27.295	2018	127	19.483

Dum la lasta jardeko de la 20a jarcento averaĝe aperis 210 libroj jare, dum la unua jardeko de la 21a jarcento la averaĝo estis 191 libroj, kaj en la komencaj 8 jaroj de la nuna jardeko (2011-18) “laste aperis” 1237 libroj, aŭ nur 155 libroj jare.

Laŭ “Laste Aperis” en 2018 surmerkatiĝis 127 libroj kun 19.483 paĝoj. Temas pri unu el la plej magraj jaroj – nur unufoje (en 2014) estis registritaj malpli multaj libroj, kaj nur dufoje (en 1993 kaj 2014) la suma paĝonombro estis malpli granda ol ĉi-jare. La eldonaĵoj estis sufiĉe ampleksaj, inter ili estas nur 12 broŝuroj malpli ol 49-paĝaj.

La ĝenra distribuo estis sufiĉe kutima kun tradukitaj beletraĵoj kiel la plej populara ĝenro, escepte de la nekutime eta nombro de la eldonitaj lerniloj – nur sep, kompare kun 26 antaŭ unu jaro.

Vilhelmo Lutermano: ĉiama ĉampiono en konkuroj

En naŭ el la dek lastaj jaroj la plej aktiva Esperanto-eldonejo estis MAS (Monda Asembleo Socia), prizorgata de Vilhelmo Lutermano, kiu eldonas plejparte politikajn kaj sociajn verkojn de maldekstraj aŭtoroj, sed ankaŭ beletron. MAS ankaŭ ĉi-foje plej altas kun 23 libroj – pli multe ol kune produktis *Mondial* (denove la dua) kaj *Fonto*, kiuj sekvas en la plejlisto.

	1991-2015	2016	2017	2018	1991-2018 Sume aŭ averaĝe
Nombro de libroj en/pri Eo	4802	189	139	127	5257
Suma paĝonombro	635.808	32.323	23.353	19.483	710.957
Nombro de la eldonintoj	1162	75	64	55	1219
Averaĝa paĝonombro de unu libro	132	171	168	153	135
Averaĝa prezo de unu libro (eŭroj)	10,00	12,84	13,01	12,45	10,27
Lernolibroj, vortaroj k. s. pri Eo	699	20	26	7	752
Originala beletro	562	30	15	26	633
Traduka beletro	997	28	32	32	1089
Lingvistiko, esperantologio	555	23	14	9	601
Eo: historio, kulturo, movado k. s.	639	28	17	14	698
Politiko, historio, filozofio, socio	513	34	26	24	597
Scienco kaj tekniko	294	5	1	3	303
Religio	235	14	5	6	260
Aliaj temoj	308	7	3	6	324

2018. Libroj		2018. Paĝoj	
MAS (Francio)	23	MAS	2432
Mondial (USA)	11	Mondial	2306
Fonto (Brazilo)	10	Fonto	1884
DEC (Kroatio)	9	Esprima.com.br (Brazilo)	1724
Ars Libri (Pollando)	7	DEC	1567
BES (Pollando)	6	Ars Libri	1419
Libro-Mondo (Pollando)	6	BES	1047
IEF (Italio)	4	Libro-Mondo	1047
KAVA-PECH (Ĉeĥio)	4	KAVA-PECH	946
Matador 74 (Bulgario)	4	UEA (Nederlando)	636

Okaze de komuna eldono, estas konsiderataj ambaŭ eldonejoj/landoj; ĉi-jare pro tiaj eldonaĵoj, realigitaj de Josip Pleadin kaj Tomasz Chmielik, en la listo estas Dokumenta Esperanto-Centro (Kroatio) kaj tri eldonejoj el Pollando.

Antaŭ unu jaro MAS rompis la multjaran unualokecon de UEA en la librolisto kaj de FEL en la paĝolisto. Ĉi-jare Lutermano firmigis siajn poziciojn. Inter la aliaj eldonejoj plej grandan progreson oni vidas ĉe la Usona eldonejo *Mondial*, kiu en la resuma librolisto promociigis de la 8a al la 6a loko kaj en la paĝolisto devancis la eldonejon de FEL kaj iĝis la dua, tuj post MAS.

1991-2018. Libroj		1991-2018. Paĝoj	
MAS	189	MAS	26344
UEA	166	Mondial	25507
Libro-Mondo	151	FEL	23917
Fonto	136	Fonto	23040
FEL (Belgio)	132	Libro-Mondo	20885
Mondial	123	UEA	20678
Impeto (Ruslando)	120	Impeto	18693
Edition Iltis (Germanio)	116	KAVA-PECH	17538
KAVA-PECH	101	Sezonoj	14218
Sezonoj (Ruslando)	87	AEP (Svislando)	12789

Francio daŭre dominas

Jam la dek-unuan sinsekvan jaron Francio estas plej alte en la laŭlanda librolisto. Sole MAS (Lutermano estas germano, ofte loĝanta en Kubo, sed la eldonejo estas registrita en Francio) kun siaj 23 libroj sufiĉus por devanci iun ajn alian landon.


Ĝi estas demonstra versio de la 74-paĝa aprila *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Ĉu forgesi aŭ pardoni?

Dittrich, Sabine. *Hereditoj de silentado: Romano / Tradukis el la germana Aleksandro Montanesko. – Dobřichovice: KAVA-PECH, 2017. – 160 p.*



La romano de Sabine Dittrich estas bone kaj profesie verkita, kun uzo de certaj kliŝoj por sentimentalaj romanoj, sed samtempe kun leĝera ironio pri tiuj kliŝoj. Ĝi legeblas facile kaj sen enuo. La lingvaĵo de la traduko estas preskaŭ senriproĉa, eble kun unu strang-aĵo: plena malagnosko de la ekzisto de la prepozicio “da”, anstataŭ kiu ĉiam staras “de”. Preserarojn mi ne rimarkis. Kaj tiom sufiĉas pri la formo kaj stilo de la verko.

Gravas ne la ĝenro, kiu estas akcesora afero, sed la temo: deportado de grandaj etnaj homgrupoj dum kaj post la Dua Mondmilito, kaj influo de tio al la postaj generacioj. La ĉefa heroino de la romano apartenas al posteuloj de la sudetaj germanoj, elpelitaj el Ĉeĥio en 1945-47. Sed eĉ pli: reale ŝia patrino estis adoptita de la germana familio, ŝiaj veraj gepatroj estis judoj, translokitaj al nazia koncentrejo por sekvonta ekstermo. Ŝia ĉeĥa amato kaj amanto devenas el la familio, kiu okupis la domon, antaŭe apartenintan al la forpelitoj, kaj, supozeble, mem implikita en tiun kruelan aferon. Kiel tio influu al la interrilatoj de la geamantoj, kiuj longe ne supozis pri tiuj eventoj, sed nun nepre devas enpensiĝi pri la aferoj.

La nazia Germanio la militon malvenkis. Ĝi kulpas pri abundego da militkrimoj, pro kiuj oni punis la ĉefajn kulpintojn, kaj pro kiuj oni ja konservas la memoron. Sed la venkintoj dum la venĝo post la liberiĝo tute ne ĉiam kondukis kiel anĝeloj, kaj agis ofte malhomece kaj eĉ pure krime, pri kio oni memori ne emas. Sed ĉu en la memoro de la suferintaj civiluloj, nenion malbonan farintaj sub kiu ajn reĝimo, tiuj maljustaĵoj ne restis? Ĉu krimo, direktita eĉ pro justa venĝa sento, sed direktita al iu, kiu kulpas nur per sia sametna aparteno kun la krimulo, ne estas, tamen, krimo? Plus la forpelitaj sudetaj germanoj en la germana teritorio tute ne ĉiam estis kun ĝojo akceptataj...

En la romano ĉiuj tiuj aferoj estas jen pli, jen malpli detale menciataj. Ofte kelk-fraza aludo diras pri certa fenomeno pli, ol longa klarigo. Ekzemple, kiam evidentiĝas, ke en grupo de deportataj germanoj, morte lacaj kaj suferantaj, la vorto “antifaŝisto” sonas kiel insulto... Tiaspecaj aludoj multas, kaj ili faras la libron tre pensiga. Kaj tra la historio de unu etna purigo kaj la sorto de la koncernaj homoj oni povas vidi la sortojn de ĉiuj similaj aferoj, ne nur tiamaj, sed ankaŭ intaj kaj ontaj, okazantaj ĝis nun en diversaj partoj de la mondo.

Sed kiel la nuntempaj homoj rilatu al iamaj eventoj? Tio estas la centra demando,


kiu interesas la aŭtorinon. Ŝi prezentas du eblajn respondojn. La unua, kies adepto estas la patro de la heroino, estas: “ne pensi pri la pasinteco, sed vivi la hodiaŭan vivon kaj konstrui bonan estontecon por si”. Evidente, la aŭtorinon la respondo ne kontentigas, ĉar, laŭ ŝi, ne nur multas homoj, kiuj dum generacioj ne povas forgesi iamajn ofendojn, sed ankaŭ povas influi la homajn interrilatojn ankaŭ nun, malgraŭ unuiĝoj de Eŭropaj ŝtatoj kaj politika trankvilo. La dua eliro, kiun anstataŭe proponas Sabine Dittrich, estas profunda kristana pardonemo, plej efika en kadroj de la romkatolika konfesio, kaj kies portantoj estas ĉefe maljunaj kamparaninoj (egale germanaj kaj ĉeĥaj). Realeco de tiu vojo en la nuna, plejparte laika, Eŭropo povas esti akceptebla ne por vastaj amasoj. Nu, ĉiu trovu sian vojon por repaciĝo ekstera kaj interna, tamen nepre trovu – aliokaze iam povos okazi nova eksplodo de kruelo.

Por pli bone klarigi la historian situacion, kiu kondukis al la eventoj priskribataj en la romano, ĝin akompanas mallonga historia skizo pri germanaj-ĉeĥaj interrilatoj, inkluzive de la Munkena perfido, okupo de Sudetoj kaj poste – de la tuta Ĉeĥio. La skizo pro la mallongeco estas iom primitiva kaj multon preterlasanta, sed nepre utila por nuntempa leganto, ne profunde konanta la historion. Krome, estas skrupulaj komentoj pri menciitaj en la libro nomoj kaj lokoj, kiuj ankaŭ ŝajnas tro simplaj aŭ superflujaj, sed, konsiderante malaltajn fonajn sciojn de la junaj generacioj pri la historio (pri kio speciale konfesas eĉ la heroino de la romano), verŝajne, bezonataj.

Nikolao Gudskov

Júlia Sigmond dankas

Júlia Sigmond. *Dankon*. – Cluj-Napoca: Exit, 2018. – 88 p.



Dankon estas la tria kaj la lasta libro en la serio D-D-D, kiun en 2012 komencis la volumo *Dialogo* kun originala Esperanta poemo de Júlia Sigmond kaj ĝiaj tradukoj en 52 lingvoj. Sekvis *Doloro* (2017), en kiu la esperantlingva poemo aperis en 54 tradukoj.

La nunan volumon Júlia Sigmond dediĉis al ĉiuj siaj esperantistaj geamikoj. Ŝia poemo estas tradukita al 62 lingvoj, dialektoj kaj lingvaj variaĵoj, inkluzive de du planlingvoj (Ido kaj Interlingua) kaj latino. Lingvoŝatantoj povas plezure esplori kaj kompari diverslingvajn versiojn. Oni povas uzi la libron en lingvaj festivaloj, poliglotaĵoj kunvenoj, kaj en klubo de lingvemuloj.

Mian atenton kaptis la ilustraĵoj, kiujn kreis Orsolya Láng. Turnante la paĝojn de la libro, oni samtempe foliumas herbarion, kaj tiuj ilustraĵoj ne estas hazardo – Júlia

Ŝatas florojn. *Dankon* estas la tria libro de Júlia Sigmond, kiun ilustris Orsolya Láng. Orsolya studis filmreĝisoradon en Universitato Sapientia en Cluj-Napoca, magistr-iĝis en la animacia fakoj de Budapeŝta Arta Universitato Moholy-Nagy. Ŝi estas aŭtoro de la romaneto *Laktostatuo* (2015) kaj poemaro *Interripo* (2016).

Jen la originalo de la poemo

DANKON

*Sen konscienciproĉo
mi rigardas la rosguton
sur la ruĝa rozburĝono.
Dankon.*

*Mi aŭskultas la alaŭdan kanton,
la zumadon de l' abeloj,
la plaŭdon de l' riveretoj,
la murmuradon de la maro.
Mi skribas*

*leterojn, rakontojn, fabelojn,
kaj mi legas
romanojn, poemojn, eseojn.*

*Mi rigardas
la ridetantajn infanvizaĝojn,
kaj mi aŭskultas
la memoraĵojn de solecaj olduloj.*

*Sen konscienciproĉo
mi vivas mian vivon.
Dankon.*

Halina Gorecka

Ĝi estas demonstra versio de la 74-paĝa aprila *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn. Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Mozaiko



La redakcio de “La Ondo de Esperanto” invitas al kunlaboro en la sekcio “Mozaiko” karikaturistojn, humoristojn, kompilantojn de krucenigmoj kaj de aliaj enigmoj.

Pri ĉielo kaj tero

Preĝo nuligita

Viro veturas al afera renkontiĝo; li malfruas, nervoziĝas, ne povas trovi parklokon por sia aŭto. Li levas sian vizaĝon al la ĉielo kaj preĝas:

– Dio, helpu min trovi parklokon. Tiam mi ĉesos drinki kaj ĉiudimanĉe mi vizitados preĝejon!

Subite per mirakla maniero antaŭ li aperas libera loko por parki aŭton. La viro denove sin turnas ĉielen:

– Ha, ne necesas. Mi mem trovis!

Kiel trafi paradizon

Laŭ longa sovaĝa laciga vojo iris viro kun hundo. Li iris, iradis, laciĝis, ankaŭ lia hundo laciĝis. Subite antaŭ li vidiĝis oazo! Belega pordego, post la barilo estas muziko, floroj, lirlado de rojoj, unuvorte, ripozo.

– Kio ĝi estas? – la vojiranto demandas la pordiston.

– Ĝi estas paradizo, vi jam mortis, kaj nun vi povas eniri kaj vere ripozi.

– Ĉu ĉi tie estas akvo?

– Kiom vi deziras: puraj fontanoj, basenoj kun friska akvo...

– Ĉu oni donos manĝi?

– Ĉion, kion vi deziros.

– Sed mi kunhavas hundon.

– Mi bedaŭras, sed kun hundoj oni ne povas eniri. Ĝin oni devas lasi ekstere.

La vojiranto ne eniris kaj lace iris plu kun sia hundo. Post iom da tempo la vojo kondukis lin al farmejo. Ankaŭ ĉi tie ĉe la pordego sidis pordisto.

– Mi volas trinki, – petis la vojiranto.

– Venu, en la korto estas puto.

– Sed mia hundo?

– Apud la puto vi trovos trinkujon.

– Ĉu manĝo haveblos?

– Mi povas regali per vespermanĝo.

– Kaj por la hundo?

– Mi trovos oston.

– Kio estas ĉi tiu loko?

– Ĝi estas paradizo.

– Ĉu eblas? La pordisto ĉe la proksima palaco diris al mi, ke paradizo estas tie.

– Li mensogas. Tie estas infero.

– Kiel vi en paradizo toleras tion?

– Tio eĉ estas por ni utila. Ĝis paradizo venas nur tiuj, kiuj ne lasas siajn amikojn.

Tradukis **Kukucapa Nemaskovskaja**

Spritaj splitoj kaj preskeraroj

El la kolekto de reduktoro

Kolonizado, aŭ: Budapeŝtaj stilitoj

Dum multaj jaroj ŝi formis la kolonojn sur kiuj kunvenis budapeŝtaj esperantistoj. (Stefan MacGill: Éva Farkas-Tatár // *Esperanto*, 2019, N°3, p. 71.)

Ĉu kruda ŝerco?

... ofte esperantaj tradukoj de verkoj el kroata literaturo servis kiel bazo por traduko al neeŭropaj lingvoj kiel la ĉina, hinda kaj farsa. (*Eŭropa Bulteno*, 2019, N°189, p. 4.)

Duhoran komencon, kreskantan potencon

Komenca horo ekde februaro: la 13a horon ĝis la 15a horon. (*Fenikso*, 2019, N°1-2, p. 4, Mallongaĵoj de la Amsterdama Rondo; rimarkis Ionel Oneț)

Strategio sen satiĝo

Oferi lunĉon por la partoprenantoj estas bona strategio. (Wendel Pontes: Modernigi Esperantajn klubojn: la Pernambuka ekzemplo // *Esperanto*, 2019, N°4, p. 65; trovis Russ Williams)

Ŝuisto, restu ĉe via ŝuŝtipo!

Tre bedaŭrinde ni konstatis gravan malkreskon de la intereso al esperanto-muziko... ege malmultaj diskovendoj, sed ankaŭ ege malmultaj elŝuvenoj... (<https://provenco.esperanto-france.org/Vinilkosmo-estas-endangxerita>; rimarkis Ionel Oneț)

Tutpola diboĉo

Romualda Jeziorowska ... preparas PEJ-semajnfion en Vroclavo por gejunuloj el tuta pollando... (Cirkulero de TEJO, dec. 2014, p. 9, <https://reto.tejo.org/d/cirkuleroj/119.pdf>)

La angoro konkursi

[Poemo] La konscio. Premita per literatura konkurso "Nova Europo" en Italujo – 1976 (Julia Pióro: *Fenestro kristala*, Gabrielli, 1981, p. 189; trovis Ionel Oneț)

Akvo stara, fakto klara

...en la enkonduka parto estis prezentitaj unuflake la fenomeno de lingvoinventado el la historia, socilingvistika kaj lingvistika vidpunktoj... (Velimir Piškorec: Interlingvistiko kaj Esperanto... // *Kresko*, 2018, N°7, p. 21)

Plukis István Ertl

Pro ĉi-jara Pasko, kiun la orientaj kristanoj festos la 28an de aprilo, la maja eldono de la *Ondo* aperos pli frue ol kutime, en unu el la antaŭPaskaj tagoj.

Se en via lando estas peranto de *La Ondo de Esperanto*, pagu al tiu en via landa valuto. Ni havas perantojn en pluraj landoj. Vidu la liston de la perantoj ĉi-sube.

Se vi havas konton ĉe UEA, sendu ĝirilon por 15 eŭroj al la Centra Oficejo de UEA (Roterdamo), kopie al nia redakcia adreso rete (sezonoj@kanet.ru) aŭ poŝte (RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando – Россия). Nia UEA-konto “avko-u”.

Vi povas uzi la internacian monpagan sistemon PayPal, vidu pli en <http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Ruslandanoj pagu 850 rublojn al Галина Романовна Горецкая poŝte (RU-236039, Калининград, аб. ящик 1205), banke (petu informojn pri la kontonumero). Ni akceptas pagojn ankaŭ per Яндекс.Деньги (konto 4100138523456, informu retpoŝte pri la pagonumero), vidu pli en <http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>.

Perantoj de *La Ondo de Esperanto*

Argentino: Roberto Sartor, Saenz Peña 3912, B° La Capilla – 52, CP 5507 – Vistalba, Luján de Cuyo Mendoza. Rete: rosar@fibertel.com.ar.

Aŭstralio: Libroservo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson St., Redfern N.S.W. 2016. Rete: libroservo@ans.com.au.

Aŭstrio: Leopold Patek, Martinstr. 104/38, AT-3400 Klosterneuburg. Rete: aon.913548977@aon.at.

Belgio: Flandra Esperanto-Ligo, Lange Beeldekensstraat 169, BE-2060 Antwerpen. Rete: retbutiko@fel.esperanto.be.

Brazilo: Brazila Esperanto-Ligo, SDS Ed. Venâncio III Sala 303, BR-70393-902 Brasília-DF. Rete: bel@esperanto.org.br.

Britio: EAB/Viv O'Dunne, Esperanto House, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE. Rete: eab@esperanto.org.uk

Bulgario: Georgi Mihalkov, «Nadeŝda» V, bl. 529, vh A et 9 ap 33, BG-1229 Sofia. Rete: modest@abv.bg.

Ĉeĥio: Pavel Polnický, Lidická 939/11, CZ-29001 Poděbrady III. Rete: Cea.polnicky@quick.cz.

Ĉinio: Trezoro Huang Yinbao, Esperanto-Centro, Jinqiao Touzi Gongsi, Jingchuan-Xian Nonglin-lu, Pingliang Gansu, CN-744300. Rete: agrikulturo@126.com.

Danlando: Arne Casper, Bryggervangen 70, 4, tv. DK-2100 København Ø. Rete: arne-casper@email.dk.

Estonio: Ahto Siimson, Kastani väikekoht 12-11, Paikuse, Pärnu maakond, EE-86602. Rete: ahto.siimson@esperanto.ee.

Finnlando: EAF / Paula Niinikorpi, Siltasaarekatu 15 C 65, FI-00530, Helsinki. Rete: paula.niinikorpi@gmail.com.

Francio: Espéranto-France, 4 bis rue de la Cerisaie, FR-75004 Paris. Rete: info@esperanto-france.org.

Germanio: Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Strasse 9, DE-55129 Mainz. Rete: abono@esperanto-buecher.de.

Hispanio: Pedro A. Garrote, C/Las Mercedes, 5-5°-C ES-47006 Valladolid. Rete: hisperanto.uea@terra.com.

Hungario: Esperanto-Centro Eventoj, Leiningen u. 4, HU-1193 Budapest. Rete: szilvasi@eszperanto.hu.

Hungario: Hungaria Esperanto-Asocio, HU-1146 Budapest, Thököly út 58-60. Rete: hungario@gmail.com.

Irlando: Joy Davies, 9 Templeogue Wood, Dublin 6W. Rete: noviresp@eircom.net.

Islando: Islanda Esperanto-Asocio, p. k. 1081, IS-121 Reykjavík. Rete: esperant@ismennt.is.

Italio: Itala Esperanto-Federacio, Via Villoresi 38, IT-20143 Milano. Rete: f-esp-it@libero.it.

Japanio: Japana Esperanto-Instituto, Sinzyuku-ku Waseda-mati 12-3, Tōkyō-to 162-0042. Rete: esperanto@jei.or.jp.

Katalunio: Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 1008 E-08204 Sabadell, Katalunio. Rete: v.sole@esperanto.cat.

Koreio: KEA, 1601 Kang Byeon Hanshin Core, 350 Mapo-dong, Mapo-ku, Seoul-121-703. Rete: kea@esperanto.or.kr.

Kroatio: Marija Belošević, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb. Rete: mbelosev@public.carnet.hr.

Latvio: Margarita Želve, Rūpniecības 35-13, LV-1045 Rīga. Rete: margarita.zelve@gmail.com.

Litovio: Litova Esperanto-Asocio, p. k 167, LT-3000 Kaunas-C. Rete: litova.ea@mail.lt.

Meksiko: Mallely y/o Magdalena Martínez Mateos Av. 523, No.187, 1a Sección de San Juan de Aragón, Del. Gustavo A. Madero, México D.F., CP 07969, México. Rete: ondo@esperanto-mexico.org.

Nederlando: Univerala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam. Rete: ionel@co.uea.org.

Norvegio: Anne Karin Bondhus, Morenefaret 8 A, NO-4340 Bryne. Rete: akbondhus@jkn.no.

Nov-Zelando: David Ryan, PO Box 3867, Wellington, NZ-6140. Rete: ryangomez@xtra.co.nz.

Pollando: Pola Esperanto-Asocio, ul. Andersa 37/59a, PL-00-159 Warszawa. Rete: sekretario@esperanto.pl.

Ruslando: Галина Романовна Горещкая, 236039, Калининград, аб. ящик 1205. Rete: sezonoj@kanet.ru.

Serbio: Miomirka Kovačević, Španskih boraca 32, RS-11070 Novi Beograd. Rete: miomirka.kovacevic@gmail.com.

Slovakio: Stano Marček, Zvolenská 15, SK-03601 Martin. Rete: revuo@stonline.sk.

Ĝi estas demonstra versio de la 74-paĝa aprila Ondo. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn. Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>